ESTAR MASSA CONNECTAT !
AÏLLAMENT SOCIAL, SOLEDAT, ANSIETAT
POCA ESTIMA D'UN MATEIX
SENTIR-SE INDIGNE D'AMOR I D'AMISTAT

malamikeco, la pioniroj de tiuj ideoj devas multe batali kaj multe suferi, oni rigardas ilin kiel homojn trenezajn, ilnane malsaĝajn, aŭ iliro eĉ rekte kiel homojn tre malutilajn. Dum la homoj, kiuj okupas sin je ĉia plej sencela kaj senutila sensencaĵo, se ĝi nur estas en modo kaj konforma al la rutinaj ideoj de la amaso, ĝuas ne sole ĉiujn bonojn de la vivo, sed ankaŭ la honoran nomon de « instruituloj » aŭ « utilaj publikaj agantoj », la pioniroj de novaj ideoj renkontas nenion krom mokoj kaj atakoj; la unua renkontita tre malmulte lerninta bubo rigardas ilin de alte kaj diras al ili, ke ili okupas sin je malsaĝaĵoj; la unua renkontita gazeta felietonisto skribas pri ili « spritajn » artikolojn kaj notojn, ne preninte sur sin la laboron almenaŭ iom ekscii, super kio ili propre laboras; kaj la publiko, kiu ĉiam iras kiel anaro da ŝafoj post la kriemuloj, ridas kaj ridegas kaj eĉ por unu minuto ne faras al si la demandon, ĉu ekzistas eĉ guto da senco kaj logiko en ĉiuj tiuj ĉi « spritaj » mokoj. Pri tiuj ĉi ideoj « estas modo » paroli ne alie, ol kun ironia kaj malestima rideto, tial tiel agas ankaŭ A kaj B kaj C, kaj ĉiu el ili timas enpensiĝi serioze eĉ unu minuton pri la mokata ideo, ĉar li « scias antaŭe », ke « ĝi krom malsaĝaĵo enhavas ja nenion », kaj li timas, ke oni iel alkalkulos lin mem al la nombro de « tiuj malsaĝuloj », se li eĉ en la daŭro de unu minuto provos rilati serioze al tiu ĉi malsaĝaĵo. La homoj miras, « kiamaniere en nia praktika tempo povas aperi tiaj malsaĝaj